


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

MIA UNUA VOJAĜO PER VAGONARO.

Kiam mi sufiĉe ekzercis min en la arto de marŝado, onklo Johano proponis kunpreni min foje al Maria-Schutz.

„Bone,” diris mia patro. „Samtempe li povos vidi la novan fervojon, kiun oni konstruis sur la Semmering. La truo en la monto estas jam preta, oni diras.”

Onklo Johano kaj mi ekiris. Ni faris ĉirkaŭvojon, intence, por ne tro proksimiĝi al la valo, tra kiu la diabla veturilo ruliĝas. Ni alvenis sur la montopinto kaj rigardis en la direkto al Spital kaj jen, kion ni vidis? Longan, rektan linion, kaj sur ĝi iu granda, bruna vermo, super kiu svebas densa, blanka fumnubo.

„Ho jen, jam estas,” kriis onklo Johano tute konsternite. „Kuru, knabo, kuru; estas diabla laboro!” Kaj ni malsuprenkuris la alian deklivon de la monto. Iom antaŭ vesperiĝo ni atingis la valon. Sed ĉu mia oĉjo eraris pri la vojo, ĉu li ne plu povis rezisti al sia scivolemo, kiu kelkfoje treege lin pikis, anstataŭ en Maria-Schutz ni trovis nin tuj antaŭ grandega rub-amaso, malantaŭ kiu nigra tunelo oscedis. La truo estis tiom granda, ke sufiĉe granda domo povus stari en ĝi. Ĝi estis ĉirkaŭe masonita, kvazaŭ pordego, kaj vojo eniris ĝin, vojo kun du glataj, senfinaj, feraj stangoj je egala distanco.

Oĉjo staris longan tempon profunde meditante. Tiam li diris: „Jen ĝi do estas! Tia do estas novmoda vojo. Sed mi ne volas kredi, ke vagonoj eniras.”

El la kavaĵo blovis malvarma vento al ni, malseketa kaj mucida, kiel el tombokelo.

En la direkto al Spital ni vidis en la radioj de la subiranta suno novan dometon apud la fervojo. Antaŭ la dometo staris masto kaj pendis du ruĝaj globoj sur ĝi. Subite ni teruriĝis, ĉar unu el la globoj supreniĝis laŭ la masto, kvazaŭ tirata de nevidebla mano: tio estis fantomado, sendube! Ni staris senmove, kiel radikoj en la tero.

„Onklo Johano,” mi flustre diris, „ĉu vi ne aŭdas zumadon en la tero?”

„Ho jes, kvazaŭ tondro; certe estas tertremo.”

Subite li ekĝemis pro timo. Sur la vojo ekaperis io, io nekonata, tutnigra monstro. Komence ŝajnis, ke ĝi staras senmove, sed ĝi fariĝis ĉiam pli granda kaj rapide proksimiĝis, furioze blovante kaj kun granda forto spirante, kaj dikan fumnubon kraĉante el sia buŝego. Kaj malantaŭ ĝi

„Kien ni savos nin!” ekkriis onklo Johano; ruliĝantaj domoj!”

Kaj efektive. Anstataŭ kelkaj ĉaroj, ligitaj al la lokomotivo, kiel ni imagis, ni vidis tutan domaron sekvanta ĝin: domoj kun multaj fenestroj kaj kapoj de vivantaj homoj malantaŭ tiuj fenestroj; kaj ĉio iris tiom rapide, kaj kun tiom da bruo

Ni estis tute konfuzitaj.

Sed mia onklo levis la manojn ĉielen kaj kriis en granda malspero: „Teruraj aferoj: ĝi eniras la kavernon.” La malluma abismo jam englutis la giganton kun la cent radoj. La lasta vagono rapide malgrandiĝis; dum kelkaj sekundoj ni vidis ankoraŭ malfortan lumeton flagri. Tiam estis finite. Sed la tero ankoraŭ tremis kaj peza fumnubo malrapide leviĝis el la nigra truo.

Mia onklo forviŝis per maniko la ŝviton, kiu gutetis de sur lia frunto, kaj daŭre fiksrigardis la truon. Tiam li turnis sin al mi kaj diris: „Ĉu vi ankaŭ ĝin vidis, mia knabo?”

„Mi vidis, onklo.”

„Do, ĝi ne estas halucinacio,” li murmuris.

Ni suriris la ŝoseon kaj dumvoje ni vidis el multaj terfendoj la fumon eliĝi; la vagonaro ruliĝis sub niaj piedoj en la interno de la monto.

„Ili estas perditaj,” verkriis mia onklo, pensante pri la homoj en la vagonaro.

II.

La hotelo sur la Semmering estis sen homoj, la staloj malplenaj; neniu vojaĝanto sidis en la manĝejo ĉetoble, nek estis videbla sur la vojo ĉe la ĉevaltrogoj. La hotelisto, kiu iam kiel potenca princo

regis ĉi tiun vojon, demandis ĝentile al ni ĉu ni deziras iom manĝi.
„Mi ne plu malsatas,” diris mia onklo.

Apud iu monumento ni haltis, por observi la montojn kaj la valojn, kiuj disigis ilin, kaj la aŭstran ebenaĵon, kiu etendis sin ĝis la horizonto. Malsuprenirante ni vidis antaŭ ni la vagonaron, ne pli granda ol raŭpo; laŭ la kalvaj montoflankoj ĝi ruliĝis rekte trans la abismoj, sur pontoj, kiuj de malproksime ŝajnis plektitaj el ferdrato; kaj jen ĝi malaperis en iu truon, jen ĝi reaparis el alia; estis mirinde!

„Kiom multe la homoj nuntempe kapablas!” murmuris la onklo en si mem.

„Jes, sinjoro, ili kegloludas per la terglobo,” diris preteriranto.

Estis vespero, kiam ni atingis Maria-Schutz. Vespermanĝinte en la gastejo, ni grimpis al la subtegmento por dormi en la fojno. La impresoj de tiu tago kaj la fremdaj aferoj ĉirkaŭ mi, fortendis de mi la dormon; sed mi kredis, ke onklo Johano profunde dormas.

Subite li komencis paroli: „Peter, ĉu vi dormas?”

„Ne, onklo.”

„Aŭskultu!”

Mi time ekstremis.

„Kion vi opinias, mia knabo? Nun ni estas tiel proksime, — se ni provus ĝin?”

Mi ne komprenis kaj do ne respondis.

„Kio fakte povas okazi al ni?” li daŭrigis. „Aliaj homoj ankaŭ faras; kial ni ne? Do, ni eluzos la okazon”

Mi pensis, ke li laŭte sonĝas kaj atente aŭskultis.

„Grandajn okulojn ili faros hejme,” li diris, „kiam ni rakontos, ke ni vojaĝis per la vagonaro!”

La postan matenon ni ekiris hejmen, kaj la onklo diris, ke li ankoraŭ pri nenio decidis, sed ke li tre deziras vidi la stacidomon de Semmering, kaj do ni iris en tiu direkto.

Ĉe la stacidomo ni vidis la alian finon de la tunelo, ankaŭ tuta nigra. Vagonaro el Vieno tuj alvenos.

La onklo komencis marĉandi kun la fervoj-oficisto. Li volis pagi ne pli ol 25 pfenigojn: „Kaj tuj post la monto, kie la tunelo finiĝas, ni eliros.”

„Post la monto, kie finiĝas la tunelo, tie ne haltas la vagonaroj,” ridis la oficisto.

„Sed se ni tie volas elvagoniĝi,” onklo Johano persistis.

„Vi devas pagi ĝis Spital, tio kostas 70 pfenigojn por du personoj.”

Onklo Johano diris, ke li iom volas oferi, sed malriĉulo kiel li, ne povas pagi kiel grandsinjoro, — kaj ke ni kune preskaŭ neniom pezas. Do, jes, aŭ ne; la oficisto ne volis konsenti pri malaltigita prezo; onklo Johano devis pagi kaj mi devis eĉ aldoni 10 pfenigojn el mia poŝo.

Intertempe aperis la vagonaro el unu tunelo kaj alruliĝis spiregante kaj blovante. Mi pensis, ke ĝi preterrapidis nin; sed ĝi fajfis, sputis, ĝemis kaj haltis. La onklo kaj mi staris sur la perono, — kaj rigardis kiel kokinoj senkapaj. Certe ni ne enirus, se la oficisto ne enpuŝus nin en la vagonon. Samtempe ni aŭdis sonorilon sonori. „Estas mia mortsonorilo,” balbutis onklo Johano.

En la vagono estis benkoj, preskaŭ samaj kiel en preĝejo. La onklo eksidis kaj rigardis tra la fenestreto. „Ho teruraĵo,” li vekriis, „jen muro, kiu forflugas!” Subite mallumiĝis ĉirkaŭ ni kaj nur lampeto ĉe la plafono donis iom da lumo.

Ekstere eĥis en la nigra nokto la zumado, la bruado, — oni dirus: potenca akvofalo; de temp' al tempo timiga fajfado

Ni veturis en la tero

Onklo Johano plektis la manojn kaj diris mallaŭte: „Mi estas preta al ĉio

Kial mi estis tiel frenezega!” Kaj longe ni restis en la malluma truo. Kiam la lumo revenis, ni vidis la muron forflugi kaj la telegraf-fostojn; kaj subite ni estis en verda valo.

Onklo Johano ekpuŝis min per la kubuto. „Peter, ĵus estis terure, sed nun, nun fariĝas plezure! Mi devas diri, vagonaro estas tamen bela afero

Ho, helpu min! Jen jam estas Spital kaj ni sidas nur kvaronhoron. Estas tro kare pagite. Ni restas ankoraŭ iom, ĉu ne?”

Mi tute pravigis lin. Mi bone rigardis la internon de la vagono, kaj ankaŭ, kvankam ne komprenante kiel funkcias, la preterflugantan pejzaĝon.

„Peter,” kriis mia onklo, „la homoj estas tre lertaj! Kiom ili hejme miros! Se mi estus riĉa, mi vere surveturigus min nian mon-ton.”

Jen la vagonaro haltis, kaj ni eliris, kun kapturino pro la rapida vojaĝo. Iu oficisto prenis niajn paperetojn, kiujn ni ricevis en Semmering, kaj li haltigis nin.

„Haltu!” li vokis, „viaj biletoj valoras nur ĝis Spital. Vi devas alpagi, amikoj, kaj eĉ duoble. Por du personoj, tio faras unu markon dudek.

Mi rigardis la onklon kaj li rigardis min. „Mia knabo,” li diris fine per raŭka voĉo, „ĉu vi havas ankoraŭ monon?”

„Ne, onklo,” mi ploris kun grandaj larmoj.

„Ankaŭ mi ne havas,” diris onklo Johano embarasite. Ni devis eniri la oficejon kaj niajn poŝojn ni devis malplenigi. Estis en ili: naztuko, — kiun ni duope uzis, kaj kiun la oficistoj ne volis tuŝi; malfreŝa pankrusto, nigra pipo, tranĉilo, fajroŝtono kaj finfine malplena leda monujo. Ni rricevis niajn posedaĵojn, kaj oni longe pridemandis nin. Finfine ni povis foriri, vespere, je la horo, kiam ni jam longe devus esti hejme. Nun ni devis serĉi nian vojon trans montoj kaj valoj en la nigra mallumo.

Kiam ni kun klinitaj kapoj forlasis la stacidomon, diris la onklo tre mallaŭte al mi: „Peter, aŭdu, la vagonaro, nu, ĝi estas tamen iom diabla!”

Peter Rosegger.

Trad: VANE.

LA KULER-FORKO.

Kara amiko, vi mire rigardas ĉi tiun objekton. Ĝi strange aspektas inter la diversaj kuriozaĵoj, kiuj ornamas tiun murbreton. Jes, estas nur kulero, kulero kaj forko el fero, kiuj formas unu objekton, sed tio ankaŭ estas la unua el miaj esperantaj memoraĵoj.

La historio ne estas gaja, sed tamen mi kredas, ke ĝi interesos vin.

Okazis en la mezo de 1918, dum la granda milito. La Germanoj estis tiam niaj malamikoj. Ili estis ankoraŭ en Francujo, sed komencis foriri. Ili iris malantaŭen paŝon post paŝo, kaj ofte ni devis halti kaj batali.

Unu tagon franca regimento atakis kaj prenis vilaĝon. Kiam, kun miaj kamaradoj, mi eniris la vilaĝon, ĝi estis denove franca nur de du horoj. Antaŭ la unuaj domoj kuŝis, mortintoj, mortantoj, disrompita materialo, pecacoj de vestoj, pecacoj ankaŭ de homoj, de junaj viroj, kiuj ne revidos plu siajn gepatrojn, siajn edzinojn, siajn fianĉinojn, siajn hejmojn.

La vilaĝo ne estis tro difektita, kaj ni eniris domon, kiu nur malmulte suferis pro kuglegoj. En la domo estis granda ĉambro, fajro estis mortanta en la larĝa kameno. Sur la granda tablo estis ankoraŭ kaldronoj, teleroj, glasoj, manĝiloj. Ĉe la muro malnova horloĝo balancis malrapide sian pendolon. Ĉe la fino de la tablo sidis homo: soldato, germana soldato. Li estis pala, tre pala, senmova. Liaj grandaj bluaj okuloj rigardis nin, sed ne moviĝis. La homo estis morta..... Antaŭ li estis telero kun terpomoj. En lia mano estis la kuler-forko, kiun vi ĵus vidis.

Miaj kamaradoj kaj mi jam de longe estis kutimigitaj vivi kun la spektaklo de la morto, sed eble neniam la morto faris je mi tiel grandan impreson. La mortinto estis blonda, ridetanta, juna — 19 jara apenaŭ — tute same kiel mi estis tiam. Plie, rigardante lin, mi fariĝis tiel pala, kiel li.

La kamaradoj ekkriis, montrante, unu post la alia, la mortinton kaj min mem: „Sed vi estas fratoj! krom la vesto vi aspektas tute same!”

Alproksimiĝinte, mi longe rigardis lin. La vortoj de miaj kamaradoj frapis kadence sub mia kranio, laŭtakte de la rondirado de mia sango, kiu nun forte reekfluis. „Vi estas fratoj, vi estas fratoj!” Malrapide mi eltiris la forkokuleron el lia malvarma mano kaj metis ĝin en mian poŝon.

Dum la tuta nokto, kiun mi pasigis en la ĉambro, el kiu ni eltiris la mortinton, malgraŭ mia lacegeco, mi ne povis dormi. Mi turnis kaj turnis min sur la planko de la ĉambro, sur kiu mi kuŝis: „Vi estas fratoj. Vi estas fratoj”

Jes, ni estis fratoj. Li estis juna, blonda, pala, bluokula, kiel mi, sed li parolis unu lingvon, kaj mi parolis alian lingvon. Kaj estis nur tio, kio faris inter ni diferencon. Nur tio estis la kaŭzo, ke li mortis hodiaŭ pro francaj armiloj, kaj ke mi morgaŭ eble estos murdata per germanaj kugloj.


Kial do la homoj ne parolas komunan lingvon, mi pensis. Kial do super la naciaj lingvoj ne estus alia supera lingvo, kiu permesus al la fratoj de ĉiuj landoj interrilatiĝi kaj interkompreniĝi — kaj mi rememoris pri Esperanto.

Esperanto..... Kiam mi estis knabo, mi vage aŭdis pri tiu ĉi lingvo, sed neniam mi trovis okazon ekscii pri ĝi kaj ellerni ĝin. Nur dum ĉi tiu sendorma nokto mi ekkomprenis la tutan eblecon, la tutan latentan potencon, kiu kuŝas en tiu lingvo, kiun tamen mi ankoraŭ tute ne konis! Kaj mi promesis al mi, se la ŝanco permesos, ke mi revenu el la granda buĉado, ellerni Esperanton kaj senlace klopodadi por la disvastigado de la tutmonda lingvo de Zamenhof.

Se tiu laboro, la disvastigado de Esperanto, povas esti agrabla, ofte, kontraŭe, kiom laciga kaj nefruktodona ĝi povas esti! Kelkfoje mi malkuraĝiĝas. Kiam la kuraĝo mankas al mi, mi rigardas al la breto, al la kulerforko, per kiu, de tiu tago, mi manĝadis ĝis la fino de la milito, kaj mi rememoras pri mia mortinta frato, kaj mi retrovas la necesan kuraĝon por iri plue al la elektita celo.

El „La Lumturo de Esperanto”. (Francujo) D. CHAGNOUX.

ENIGMOJ.



a, a, k, k, n, n,
n, o, o, o, o, o, r,
r, t, t, t, u, u,
ŭ, ŭ.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale: 1. sezonon, 2. arbobarton.

e, e, e, k, k, l,
o, o, o, o, o, o,
p, r, r.


La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale: 1. beston; 2. granan fluidaĵon; 3. adverbbon; 4. nomon de esp. litero; 5. vokalon.

Riga (Latv.)

B. REICHBERG.

Inter la solvintoj ni dislotos 3 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 15 Novembro.

LA SOLVOJ EL NO I.



Premiojn ni sendis al:
F.ino D. Lind, Mantorp, (Sv.).
F.ino Meydam, Leerdam (Ned.).
S.ro C. Giovanni, Pisa (It.).

Premion pro verkaĵo gajnis: S.ro Krolski, Barlin, (Franc.); F.ino de Boer, Rotterdam, (Ned.), S.ro Cate, London (Angl.).

RECENZOJ PRI „L.J.V.”.

„Informilo” (Ned. Esp. Gruparo) (Aŭg.—Sept. '36): Ni ricevis la duan jarkolekton de tiu ĉi bela gazeto por la junularo kaj komencantoj, sed tuj aldonas, ke ankaŭ plenkreskuloj povos trovi en ĝi multegan scion.

La enhavo estas treege valora kaj pedagogie altnivela. Ĝi celas instrui ekz. la gramatikon al junuloj je maniero, kiu interesas la lernantojn. Esperantoscio kresku en ili, same kiel la scio pri la propra lingvo kreskis. Kiel ili lernis la propran lingvon per aŭdado, tiel ili lernu ankaŭ esperanton per aŭdado kaj imitado. Tio estas la starpunkto de la redaktorino kaj ni ofte spertis, ke ŝi en la praktiko praviĝas. Entute ĝi estas tre bela kolekto.

„Brita Esperantisto” (Sept. '36): „..... Ni uzas la okazon denove rekomendi ĉi tiun ilustritan gazeton ne nur al lernejoj kaj infanoj, sed ankaŭ al ĉiu kursestro, kaj al ĉiu izolita lernanto, kiu deziras simplan, interesan, kaj instruajn legaĵon. Ĝi forigas efektivan mankon en nia gazetaro.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, rivevos donace „Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do libron de proksimume 200 paĝoj.

Por komencantoj.

NIA LINGVO.

(Melodio „Alfluegu, popolaroj” — Strömt herbei, ihr Völkerscharen — de J. Peters).

Tra la mondaj malproksimoj	Voku, lingvo de l'espero,
Sonas voko pli kaj pli,	Plu kaj plu de kor' al kor'!
Muroj, baroj, landaj limoj	Ni vin sekvas kun fiero,
Ne ekzistas kontraŭ ĝi.	Kun fidelo kaj fervor'.
Ne la glavon ĝi admonas,	Brilu, brilu, verda stelo,
Amon, pacon en liber',	Super landoj, super mar',
Ĝojon kaj feliĉon donas	Kaj konduku al la celo
Nia lingvo de l'esper'.	Nin tra nokto kaj nubar'.

Dio, helpu nin kaj donu,
 Ke la revo iĝu ver'!
 Kara lingvo, sonu, sonu
 Ĉie, ĉie sur la ter'!
 Verda stelo, kondukanto,
 Radiegu pli kaj pli!
 Vivu, vivu Esperanto,
 En eterno vivu ĝi!

Berlino (Germ.)

KARL VANSELOW.

LA GLAVO DE DAMOKLESO.

Iam estis reĝo, nomita Dionizio. Tiu ĉi reĝo estis tiel kruela, ke oni nomis lin tirano. Li sciis, ke la popolo malamas lin, kaj tial li timis, ke iu lin mortigos. Sed li estis tre riĉa kaj loĝis en bela palaco. Granda nombro da servistoj servis al li, kaj ili estis ĉiam pretaj por plenumi lian ordonon.

Iun tagon unu el liaj amikoj, kies nomo estis Damokleso, venis por vidi lin, kaj diris: „Kiel feliĉa vi devas esti. Tie ĉi vi havas ĉion, kion homo povas deziri.”

„Ĉu vi volas esti reĝo?” diris la tirano. „Eble vi volas interŝanĝi kun mi.”

„Ho, tute ne, ho reĝo!” diris Damokleso; „sed mi pensas, ke, se mi estus tiel riĉa kiel vi, mi estus tre feliĉa. Se mi povus nur havi vian riĉon kaj vian plezuron, mi ne dezirus pli grandan feliĉon.”

„Tre bone,” diris Dionizio, „mi lasos vin ĝui mian riĉon kaj mian plezuron.”

„Kaj tiel la sekvan tagon, Damokleso venis en la palacon, kaj ĉiuj servistoj traktis lin kiel sian propran mastron. Li estis vestita (oni vestis lin) per reĝaj vestoj, kaj sidis ĉe belega tablo. Riĉaj teleroj staris antaŭ li, kaj estis belaj floroj, kaj maloftaj parfumoj, kaj multekosta vino, kaj dolĉa muziko. Li sidis sur molaj kusenoj kaj li sentis, ke li estas la plej feliĉa homo en la mondo. Tiam li okaze levis la okulojn al la plafono. Kaj kion li vidis! Io brila pendis super li, kaj ĝia akra pinto preskaŭ tuŝis lian kapon! Ĝi estis glavo! Kaj ĝi pendis per ununura haro! Kaj la haro povas rompiĝi je ĉiu momento! Se la haro rompiĝus, kio okazus?

Damokleso fariĝis pala kaj la rideto malaperis de lia vizaĝo. Li tiom timis, ke li ne kuraĝis movi sin. Lia apetito iris for. Li ne povis manĝi nek trinki. Li deziris eliri el la palaco, kaj tre malproksimen — li ne atentis kien.

„Kio estas al vi?” diris Dionizio.

„Tiu glavo! tiu glavo!” kriis Damokleso.

„Jes,” diris Dionizio, „mi scias, ke glavo pendas super via kapo. Ĝi povas fali je ĉiu momento. Sed kio pri tio? Glavo **ĉiam** pendas super mia kapo. Mi estas ĉiam en timo, ke iu venos kaj prenos mian vivon. Mi povas perdi mian vivon je ĉiu momento.”

„Nu, mi iru!” diris Damokleso. „Mi nun vidas mian eraron. La riĉuloj ne estas tiel feliĉaj, kiel ili ŝajnas. Mi reiru al mia dometo inter la montoj!”


Kaj tiom longe kiom li vivis, li ĉiam diris: „Mi ne volas esti reĝo. Mi ne interŝanĝus kun la reĝo eĉ por momento.”

El „Kosmo”.

(Japanujo) J. KACUGARI.

- I. Lernu parkere „Nia Lingvo” kaj deklamu ĝin en via grupo.
- II. Legu kelkfoje „La glavo de Damokleso” kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- III. Respondu al jenaj demandoj pri „La glavo de Damokleso”:

Kial oni nomis Dionizion tirano? Kial li timis, ke oni mortigos lin? Kiaj estis la servistoj? Kial Damokleso kredis, ke Dionizio estas feliĉa? Kion diris Damokleso? Kion proponis Dionizio? Kio okazis? Ĉu Damokleso estis feliĉa en la palaco? Kion li rimarkis super sia kapo? Kiel pendis la glavo? Kial pendis la glavo super Damokleso? Kiu pendigis ĝin? Kiun eraron vidis Damokleso? Ĉu li poste deziris esti reĝo?



DRAMO EN TRI AKTOJ.

Faru verkaĵon laŭ la supraj bildoj, kaj sendu ĝin antaŭ 15 Novembro al: Red. „La Juna Vivo”, West-Grafdijk, Nederlando. Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni dislotos du premiojn.

Estas tre rekomendinde rakonti laŭ la bildoj en la grupkunvenoj!

KORESPONDADO.

Ludmila Jevsejeva, Riga (Latv.): Via kanto estas bela. Ni atendas la muzikon.

Provsav M. Filipovic, Korsman, (Jugosl.): Vian abonkotizon por la tria jaro pagis: S.ro Knip, Utrecht. (La antaŭan jaron pagis S.ro Veldman, Leeuwarden).

Pifa, en Hago (Ned.): Ĝi multe similas la konatan rakonton pri la ŝtonhakisto de Multatuli (en Max Havelaar). Tiu rakonto jam aperis.

St. H. en Zg. (Pol.): Ne taŭga por la gazeto.

LA DEK KVINA LECIONO.

A. Kiu nun skribas leteron estas skrib-**anto**. Kiu nun promenas estas promen-**anto**. Kiu nun kantas estas kant-**anto**.

Muzikanto, naĝanto, kolektanto, prezidanto, vizitanto, migranto, vojaĝanto, laboranto, ludanto, preter-iranto, lernanto, parolanto.

Muzik**anto** — muzik**isto**, vojaĝ**anto** — vojaĝ**isto**, — labor**anto** — labor**isto**.

B. Arbo — arb-**aro**, dento — dent**aro**, ilaro, foliario, vortaro, gazetaro, **tendaro**, homaro, amikaro, **ŝtuparo**, kantaro, vagonaro, hararo, montaro, kamparo (kamparano), **ŝiparo**, adresaro, meblaro, vest-hokaro, bestaro, stelaro, junularo, infanaro, ŝafaro.

C. Helpu la infanon, **por ke** ĝi ne falu!

Parolu klare, **por ke** ni komprenu vin.

Donu al li akvon, **por ke** li povu trinki.

D. Multekostaj pafoj.

Ĉasisto dum tuta tago trairis arbaron kaj kamparon, sed vidis **nek** anason, **nek** leporon. Tre malkontenta li iris hejmen.. **Subite**, apud **farm**-domo, li vidis **lage**ton, en kiu **naĝis** **almenaŭ** tridek anasoj. Ĉe la **lage**to estis farmisto, kiu **streĉe** laboris. La ĉasisto iris al li kaj diris: „Mi **donos** al vi **dolaron**, **se** mi **rajtas** **pafi** la anasojn. Ĉu vi konsentas?”

„Nu, faru. Sed **zorgu**, ke vi ne **trafu** min!”

La ĉasisto celis, pafis — kaj kvin birdoj perdis la vivon. Li **denove** **turnis** **sin** al la farmisto kaj denove **ricevis** **permeson** pafi. Nun li trafis tri anasojn. Li **pagis** duan dolaron kaj diris: „Vi postulas malmulte. Ĉu vi ne **pentas**, ke vi perdis ok anasojn por nur du dolaroj?”

La farmisto respondis: „Ho ne! La anasoj ne apartenas al mi, sed al mia najbaro. Vidu, tie li alkuras.”

La **posedanto** estis **furioza**. Li demandis, ĉu la ĉasisto estas **freneza**. Li postulis **kompensaĵon**.

Nun la ĉasisto devis pagi ankoraŭ multe pli, **por ke** la posedanto ne turnu sin al la polico.

- I. Kopiu kaj lernu la novajn vortojn.
- II. Kopiu A, B, C, D. en vian kajeron.
- III. Traduku A, B, C, D. en vian gepatran lingvon.
- IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kion trairis la ĉasisto? Ĉu li vidis multajn anasojn kaj leporojn? Kien li iris? Ĉu li estis kontenta? Kion li vidis? Kio estis en la lageto? Kiu laboris ĉe la lageto? Ĉu li laboris streĉe? Kion diris la ĉasisto? Ĉu la laboristo konsentis? Kion li diris? Ĉu la ĉasisto trafis multajn anasojn? Ĉu li pagis duan dolaron? Kion li tiam diris? Kial la laboristo ne pentis? Kiu alkuris? Kia estis la posedanto? Kion li demandis? Kion li postulis? Ĉu la ĉasisto nun devis pagis pli?

La instruanto instigu la plej lertajn kaj fervorajn lernantojn al eksterlecionaj taskoj. Komence nur facilaj rakontetoj, ekz. „Kiom da plezuro (paĝo 12), „Ses katidoj” (paĝo 43), „La rabobestoj” (paĝo 28). Ankaŭ fari verkaĵojn laŭ la bildoj estas taŭga ekzercado.

LA DEK SESA LECIONO.

A. Mono — mon-ero, pano — pan-ero, **neĝo** — neĝero, fajrero, polvo, lignero, **sablero**, salero.

B. Igi verda — verd-igi, igi certa — cert-igi, igi varma — varmigi, beligi, grandigi, sanigi, altigi, pli-altigi, mal-altigi, ali-igi, forigi, blankigi, **blindigi**, dikigi, **pintigi**, **publikigi**, ordigi.

C. IAM ESTIS MALJUNULO.....

Iam estis maljunulo, kiu trovis moneron. Por tiu li aĉetis **porkon**. Sed la porko ne volis iri, do li devis ĝin **porti**. Tiam li renkontis hundon. „Hundo, ĉu vi volas **mordi** la porkon? La porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.” „Ne,” diris la hundo. Tiam li renkontis bastonon. „Bastono, ĉu vi volas **bati** la hundon? Ĉar la hundo ne volas mordi la porkon kaj la porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.” „Ne,” diris la bastono. Tiam li renkontis fajron. „Fajro, ĉu vi volas bruligi la bastonon? Ĉar la bastono ne volas bati la hundon kaj la hundo ne volas mordi la porkon, kaj la porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.” „Ne,” diris la fajro. Tiam li renkontis akvon. „Akvo, ĉu vi volas **estingi** la fajron, ĉar la fajro ne volas bruligi la bastonon kaj la bastono ne volas bati la hundon kaj la hundo ne volas mordi la porkon kaj la porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.” „Ne,” diris la akvo. Tiam li renkontis bovon. „Bovo, ĉu vi volas **trinki** la akvon? Ĉar la akvo ne volas estingi la fajron kaj la fajro ne volas bruligi la bastonon kaj la bastono ne volas bati la hundon kaj la hundo ne volas mordi la porkon kaj la porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.” „Ne,” diris la bovo. Tiam li renkontis ŝnuron. „Ŝnuro, ĉu vi volas ligi la bovon? Ĉar

la bovo ne volas trinki la akvon kaj la akvo ne volas estingi la fajron..... ktp. „Ne,” diris la ŝnuro. Tiam li renkontis muson. „Muso, ĉu vi volas **rodi** (mordeti) la ŝnuron? Ĉar la ŝnuro..... ktp.” „Ne,” diris la muso. Tiam li renkontis katon. „Kato, ĉu vi volas **kapti** la muson? Ĉar la muso ne volas rodi la ŝnuron kaj la ŝnuro ne volas ligi la bovon kaj la bovo ne volas trinki la akvon kaj la akvo ne volas estingi la fajron kaj la fajro ne volas bruligi la bastonon kaj la bastono ne volas bati la hundon kaj la hundo ne volas mordi la porkon kaj la porko ne volas iri, do mi devas ĝin porti.”

„Jes”, diris la kato. Kaj tiam kaptis la kato la muson, la muso rodis la ŝnuron, la ŝnuro ligis la bovon, la bovo trinkis la akvon, la akvo estingis la fajron, la fajro bruligis la bastonon, la bastono batis la hundon, la hundo mordis la porkon ... huj, huj, huj... kaj tiel ĝi eniris la porkejon.

- I. Lernu la novajn vortojn kaj notu ilin en aparta libreto.
- II. Kopiu A, B, C en vian kajeron.
- III. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.
- IV. Lernu parkere „Jam estis maljunulo” kaj deklamu ĝin en la kunveno.

TERO, ĈIELO ESTOS RUIN'.

(Ĉenkanto por 2 voĉoj).

① G

1-G 3 3 3 | 2 . 3 4 | 5 6 7 | 1 . ? |

Te-ro, ĉi - e --- lo es-tos ru -- in'.

② G

5 5 5 | 4 . 5 6 | 4 4 4 | 3 . 4 5 |

Sed verda ste --- lo, sed verda ste --- lo.

e

3 3 3 | 2 . 3 4 | 5 6 7 | 1 . ? ||

sed ver-da ste -- lo res-tos sen fin'.

VIZITO DE LERNANTINOJ AL ANGLUJO — PASKON 1937.

Moderna, bone ekipita, popollernejo en Birminghamo, Anglujo, kie oni instruas Esperanton, deziras inviti lernantinojn, 11—17 jaraj, el aliaj landoj, pasigi unu semajnon, de sabato, Marto 27 ĝis sabato Aprilo 3, 1937, por interkonatiĝi, per Esperanto, kun la anglaj lernantinoj.

La kosto, sen vojaĝelspezoj, sed inkluzive de loĝejo en la lernejo mem, manĝaĵoj, kaj ekskursoj, estas nur po dek kvin ŝilingoj, (6 guld.), por persono, por la tuta semajno.

Estas necese, ke ĉiu grupeto estu prizorgita de respondeca persono. Pri la vojaĝelspezoj al Birminghamo oni devas sin informi ĉe naciaj turistagentejoj kaj havigi la necesajn biletojn. Arangoj estos farataj por renkonti la grupojn en Londono.

Dum la semajno, oni vizitos la ĝardenan vilaĝon Bournville kaj la Cadbury ĉokolad. fabrikejon, kaj oni faros ekskurson al Stratford-on-Avon, la koro de la SHAKESPEARE distrikto.

Estas bonega okazo, ne nur vidi belan anglan kamparon, sed viziti faman industrian urbon, partopreni interesajn festetojn kaj ekskursojn, kaj fari internacian amikecon.

Se vi deziras akcepti ĉi tiun bonegan inviton, bonvole skribu, tiel frue, kiel eble, al F.ino N. Shoppard, Tinker's Farm Lernejo, Morthfield Birmingham, Anglujo.

La redakcio de „La Juna Vivo” kun plezuro enpresigas supran inviton. Ĝi tre ĝiĝus, se troviĝus junuloj, kiuj deziras kaj finance povas partopreni en vojaĝo al Birmingham. La redakcio ankaŭ volonte pretas gvidi grupon.

La vojaĝkosto tien kaj reen de la trajekto Vlissingen-Birmingham sumiĝas proksimume 19 guld. Pri tio la venonta numero enhavos pli detalajn informojn. Kiu deziras ĝui tre belan kaj lernigan libertempon baldaŭ turnu sin al la redaktorino de „La Juna Vivo”.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „L.J.V.”: Vire (Franc.), Košice (Ĉeosl.), Lutte (Ned.), Alschwill (Basel) (Svis.).

2. Grupoj en jenaj lokoj jam por la tria fojo uzas „L.J.V.”: Brünn (Ĉeosl.), Poruba u Orlové (Ĉeosl.), Plzen (Ĉeosl.), Zwettl (Aŭstr.), Bishop Auckland (Angl.), Boujan S. Libron (Franc.), Buxières d'Aillac (Franc.), Amâl (Sved.), Tibro (Sved.), Purmerend, Beets, Kwadijk, Middellie, Uitgeest, Heiloo, Koedijk, Stomporetoren, Schermerhorn, Benningbroek, Drachten, Heerenveen, Broek in Waterland, Rotterdam, M. Beemster, Langereis, Haarlem, Sliedrecht, Delft (ĉiuj en Ned.).

3. En „Bulteno de Esp. Societo „Nova Sento” en Barcelona, aperis, hispanlingve: „Charles Dickens” el „La Juna Vivo” No I (36).

ATENTU!!!

Nova peranto en Argentino estas: S.ro H. J. Ceretti, Ing. Radio-E., Prov. de la Univ. Pop. del Rosario, 9de Julio 3301, Rosario.

Korespondadrosajn oni bonvole sendu rekte al la redakcio.

KORESPONDADRESOJ.

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj (por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 guld.).

Ĉeĥoslovakujo: S.ro R. Trojna, Breclav, 33-jara, dez. kor. per let. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Interŝanĝi ĉion. Certa respondo.

Ĉeĥoslovakujo: Mi dez. kor., interŝ. poŝtm., portretojn, monerojn. Skribu baldaŭ. Resp. certa. Otokar Michl., studento, Stězery u Hradce Král

Ĉeĥoslovakujo: S.ro J. Hargass, Spis, Nová Ves, Rumanova 13, dez. kor. kun gesamideanoj finnaj, norvegaj kaj svedaj. Respondo certa.

Francujo: F.ino Madeleine Ménot, 2 Rue de la Manufacture, Orléans (Loiret) dez. interŝ. poŝtkartojn ilustritajn, fotojn, kun ĉiuj landoj.

Nederlando: S.ro P. J. v. d. Heiden, Zaanstraat 8, Utrecht, dez. gvidlibretojn, poŝtkartojn, gazetojn, kaj korespondi kun ĉiuj landoj. Certa respondo.

Nederlando: Dez. kor. en New York por serĉi perditan ned. amikon, kiu loĝas (?) 200. East 90th street, N.Y. City. J. D. Krispyn, Wognummerstr. 43, Amsterdam.

Nederlando: 14 jara knabo dez. kor. M. Leegwater, West-Graffdyk, (N.H.).

Nederlando: 13 jara knabo dez. interŝ. poŝtm. W. v. Veenendaal, West-Graffdyk.

Nederlando: 15 jara knabo dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. S. Kool, West-Graffdyk.

Nederlando: 15 jara knabino dez. kor. F. Jantjes, West-Graffdyk (N.H.).

Svedujo: 22-jara f.ino dez. kor. kun ĉiuj landoj, interŝ. poŝtkartojn, poŝtmarkojn, desegnaĵojn, ktp. D. Lind, Viby Löt, Mantorp.

Nederlando: Tri fratinoj (15-16-18-jaraj) dez. kor. kun samaĝaj knaboj J. T. D. Hoevers, Watergangseweg 80, Tuindorp, Nieuwendam.

U.S.S.R.: Amiko en Sovet-Unio deziras korespondi pri ĉiuj temoj, kun amikoj el Norda kaj Suda Ameriko kaj Alĝerio. Certa respondo. Srkibu al: E. Malahev, Rajkom Esperantistoj, Postiŝevo Donbas. Ukraino.

Ĉeĥoslovakujo: Kiu havas nenecesajn esp. aĵon (gazetojn) propagandcele sendu ilin al: S.ro A. Frolisek, Horni Bojanovice, l. p. Hustopice, Brna.

Ĉeĥoslovakujo: 13 jara studentino dez. interŝ. poŝtk. il., poŝtm., kaj kor. kun eksterl. knabinoj: Vera Lhotská, Praha, Liben, Podvini 43.

Nederlando: 5 infanoj (12—14 jaraj) deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Adr.: F. ino N. Garms, Kwadijk (N.H.).

Nederlando: 16 jara fraŭlino petas korespondadon kun samaĝaj knaboj el ĉiuj landoj. J. E. Ammeraal, Nieuwendammerstr. 34, Nieuwendam (A'dam).

Nederlando: 15 jara knabo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. B. Jukema, St. Annaparochie (Fr.).

Nederlando: 7 Geknaboj, 11—16 jaraj, dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kun ĉiuj landoj. Certa resp. Skribu al: S.ro M. Muilwijk, B 270, Slikkerveer.

Nederlando: Miaj gelernantoj (18—25 jaraj) dez. kor. kun ĉ.l., pri ĉ.t. Bonv. skribi al: F.ino M. Wittop Koning, Fr. v. Mierisstr. 121, Amsterdam.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.

ANONCETOJ. (30 c. por ĉiu linio).

KORESPONDEMULO! Niaj membroj fervore deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, kaj ni volonte kaj **senpage** enpresigos vian adreson en nian monatan gazeton „Amikoj de Esperanto”, kiu estas eldonata ekskluzive por korespondantoj kaj libro-amantoj. Sendu vian adreson senprokraste — hodiaŭ! Abonkotizo por unu jaro: 1 sv. fr. aŭ egalvaloro. Petu specimenon! „Amikoj de Esp.”, 2 Kudan 3-ĉome, Kojimaĉi-ku, Tokio, Japanujo.

PROPAGANDU! Bonvolu inspiri la Esp.-Propagandan Komitaton en Amersfoort, per proponoj rilate al Esp. propagando. Sendu (interŝanĝu) al la prez.: stratkartojn, faldfoliojn, broŝurojn, gazetojn, k.a. esperantaĵojn por la publikaj gazetuloj. Adr: Leusderweg 215, Amersfoort, Nederlando.

NOVA VENKO KAJ NOVA KONKURSO. Fremdultrafika Asocio de Oslo ĵus konsentis aranĝi internacian konkurson. — En la semajna organo de la Asocio „Oslo denne uke” estos en la unua semajno de oktobro publikigata **3 Esp. lingvaj artikoloj pri Oslo**, el kiuj oni devas — ĝis la 31a de januaro — ion traduki en nacian lingvon kaj aperigi en kiel eble plej multaj gazetoj. — La asocio disponigas **5 valorajn premiojn**. — Ĉiu esperantisto partoprenu! Ni montru al tiu grava Fremdultrafika Asocio, ke Esperanto utilas. Jam nun petu la konkurson numeron (kun artikoloj kaj kondiĉoj) de la Asocio: „Reisetráfikkforeningen, Egertorvet, Oslo, Norvegujo. Indiku, kiom da ekempleroj vi bezonas.

<p style="text-align: center;">REKLAMTARIFO:</p> <p>1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.</p> <hr/> <p style="text-align: center;">„IDEALA ESPERANTO BIBLIOTEKO”</p> <p>eldonas:</p> <p>BLUA SANGO Willy Wood. LA MOREA PERLO D. Simson. IRISIS H. 't Sas.</p> <p>SUB LA VITRA KUPOLO L. v. Weddingen.</p> <p style="text-align: center;">Ĉiuj interesaj romanoj, 200 p. Prezo nur po f 0,50. (plus f 0,20 por sendkosto).</p> <p>Aĉetante la 3 unuajn ekz. oni pagas nur f 1,35 + f 0,60.</p> <p>Mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!</p>	<p style="text-align: center;">SKRIBA KURSO por A. kaj B.</p> <p style="text-align: center;">(nur por holandlingvanoj).</p> <p>Tre detala B-kurso. Gvidanto Simon Aarse.</p> <p>Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.</p> <p style="text-align: center;">La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.</p> <hr/> <p>NE FORGESU</p> <p>ke le la unua bindita jarkolekto de „LA JUNA VIVO” estas la plej valora kaj malkara lernolibro por Esperantokursoj en ĉiuj landoj</p> <p>Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld. Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.</p>
---	--

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)